

SUDFRANCIA ★ STELO

N° 168 – 1a kvaronjaro 2004 – 1° trimestre 2004 – 1^E50

☆☆
 Dulingva bulteno eldonita de la Esperanto-federacio de Langvedoko-Rusiljono
Bulletin bilingue édité par la fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon
 Jarabono/Abonnement : 6 € al pĉk/au CCP 956-28 P Montpellier (fédé d'E°)
 ☆☆☆

CONGRES FEDERAL – Dimanche 25 Avril – NARBONNE
Hôtel de Ville, salle des mariages, de 10h à 18 h .

Kiel okazis antaŭ kelkaj jaroj, ni kunvenos dimanĉe ; espereble tio faciligos al kelkaj, kiuj laboras dumsemajne, partopreni ĉifoje .

La tagordo estas plenplena, bonvolu ne alveni (tro) malfrue !

Ni tagmanĝos en kafeterio « Liberté », kiun rekomendis nia amiko Jean-Pierre Peray . La bufedo estas ...43 metrojn longa kun pli ol cent produktoj kaj la menuo kostas nur 11^E (aldoni la trinkaĵojn, ekzemple vinon aŭ akvon kaj kafon por 2^E50 kaj eventuale varman pladon –inter 2^E kaj 3^E30- sed la bufedo pli ol sufiĉas !) ...sed oni ne venas al federacia kongreso nur por la tagmanĝo (ĉu ?) . Atendos nin sufiĉe ampleksa programo . Jen iuj el la programeroj :
 -Morala kaj financa raportoj -Detale pri la forumoj de asocioj, la staĝoj, la kursoj, la vojaĝ-
 -prelegantoj, la vivo de la grupoj kaj de la federacio, la rilatoj kun UFE, la bulteno, informiloj kaj propektoj, ne forgesante la renovigon de triono de la komitato (« renovigeblaj » estas F. Bernard, C. Carbonnel, J. Hénin ; ili bonvolu informi la sekretarion -0468555177-ĉu ili rekandidatiĝas) kaj de la estraro . Kandidatoj bonvenas !


Ni ankaŭ parolos pri kongresoj, projekto por la Universala Kongreso de Vilnius en 2005 .

Posttagmeze ni diskutos pri argumentoj por prezenti kaj antaŭenigi esperanton .

Fine estos prezentata la listo EDE (Eŭropa baloto) .

Venu kun via entuziasmo, viaj ideoj kaj sugestoj...kaj via preteco helpi al la plua vivado de la federacio . Ankaŭ vidu sur la paĝo dua planeton por trovi la rendevuejojn kaj NEPRE rezervu la komunan tagmanĝon ĝis vendredo la 16a de aprilo (ni ne estos solaj en la restoracio !). Ĝis !

*Veuillez réserver jusqu'au vendredi 16 avril le repas de midi (détails ci-dessus)
auprès de notre dévouée trésorière Lucette Négron 04 67 71 05 79 ; Merci .*




*Narbonne : Place de l'Hôtel de Ville et Via Domitia
 Basilique St Just et buffet de la cafétéria « Liberté »*



PLAN DU CENTRE DE NARBONNE

Stationnement gratuit recommandé dans les endroits marqués x, spécialement le long du Bd Mistral, le long du canal près du Pont Voltaire ou dans la rue Fabre (près de la Place Salengro)

250 m



Vers Perpignan

CAFETERIA

SNCF

CONGRES

Avenue du Mal Juin

VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

Vizito de Litovino (la 14an de Januaro)

Kvankam ŝia vizito estis tre mallonga (nur unu posttagmezo), ĉiuj estis tre kontentaj. Graĵina prezentis filmon pri sia lando kaj parolis pri la kutimoj antikvaj kaj nunaj. Ŝi parolis pri la UK en Vilnius en julio 2005. Pluraj ĉeestintoj intencas vojaĝi kaj partopreni en tiu UK. La komencantoj komprenis grandparte esperanton, do estis tre ĝojaj, konstatante, ke esperanto funkcias bone! Inter la trideko da partoprenintoj, 2 ne estis esperantistoj, kaj pluraj venis de la ĉirkaŭaĵoj, ankaŭ de Montpellier, Lozère. Dankon al ili. (*Vidu ankaŭ sur p.7 gazetartikolon pri ŝia vizito*).

Ĝenerala kunveno (la 14an de februaro)

Ni reelektis la saman estraron. Ni partoprenos en la Aleoj de Asocioj la **duan sabaton de septembro** (11 IX) kaj kunvenos iom pli frue por la organizado. Kelkaj grupanoj ŝatus vojaĝi al Strasburgo la 9an de majo, ni atendas pliajn informojn (praktikajn detalojn) pri tiu vojaĝo fare de la grupo de Tuluzo, kiu antaŭvidas buson. *NDLR: La manifestacio « Bunto » (vidu la lastan SFS) komenciĝos je la 14a horo, do necesos forveturi tre frue.*

Staĝo de Vias (19-26 V)

Ni memorigas, ke oni rajtas partopreni la tuton, kelkajn tagojn aŭ nur unu tagon (kursoj, ekzamenoj, vesperoj). Ĉiu partoprenonto estas certa trovi kurson je sia nivelo. Ĉiu vespero havos apartan temon: teatro, ludoj, prelego, lotado. Plie, se vi havas « talenton » aŭ ideon, faru proponon. Ni ĝojus.

Datoj de la venontaj kunvenoj (ĉiam sabate je 14h en MVA)

3a de aprilo (pli frue ol kutime pro la proksimeco de Pasko), **15a de majo**, **12a de junio**. La 12a de junio estos GRAVA, ĉar ni devos decidi ĉiujn datojn pri septembro kaj aliaj monatoj, eĉ 2005. Plie ĉu ni kune piknikos fine de junio? Kiam? Kie?

Ni esperas, ke la plimulto el niaj grupanoj partoprenos en la staĝo (19a-26a de majo). Rapidu aliĝi! *En nia lasta kunveno ni decidis sendi leteron pri simpatio al la hispanaj esperantistoj. Ni tuj redaktis ĝin. Ni ankaŭ skribis al « Attac » pri la diskuto koncerne la lingvo-diversecon kaj pri la solvo per esperanto.*

Lastminute: « Attac » respondis, vidu p.11

LUNEL: « verda » urbo?

Kiel scias niaj legantoj, tie loĝas nia sindonema kasistino (*Lucette Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel. Parenteze, se vi ankoraŭ ne pagis vian abonon por 2004, rapidu por eviti al ŝi pli da streso!*). Ankaŭ tie funkcias nun kurso en kolegio. Antaŭ nelonge la biblioteko de la grupo de Montpellier, kiu dormis en iu remizo, translokiĝis tien, en ĉambro afable disponigita de la urbestro de Lunel-Viel kaj nun, en tiu sama ĉambro, dank al nia aktiva amiko Jorgo (Georges Gonthier), ekfunkcias esperanto-klubo. Antaŭ la malfermo de la klubo aperis artikolo pri esperanto en gazeto de Lunel-Viel. Gratulojn al la Lunelanoj, bonan sukceson al la nova E-klubo!

MONTPELLIER

La 2an de januaro paro el Belgio vizitis Montpellier, gvidita de Rosa Aumeunier. Surpriza sed interesa vizito.

La unuan kunvenon de la jaro en januaro partoprenis 13 geamikoj (6 senkulpiĝis aŭ estis malsanaj). Annick Tora, la prezidantino, bondeziris al ĉiuj kaj anoncis la diversajn renkontojn de la jaro. La grupo ricevis dankojn pro partopreno en la tago de la tria mondo. G. Gonthier intervenis ĉe la urbestro de Lunel-Viel por peti lokon por nia biblioteko (vidu la raporton supre). A. Capus informis nin pri la biblioteko de nia forpasinta amiko A. Diez. Oni atentigis pri la dato de la ĝenerala kunveno. Post la komuna tagmanĝo, ni gustumis la Reĝan kukon. Bonan jaron, bonan sanon, bonan Esperanton! Ĝenerala kunveno de la 7a de februaro: 18 partoprenantoj, 6 membroj senkulpiĝis kaj ni ricevis 4 prokurojn. Annick Tora detaligis la agadraporton. Kelkaj ŝanĝoj en la estraro: Reine Celiqva estos helpantino de la kasistino Jeanne Bès, Monique Eysseric helpantino de la sekretariino Rosa Aumeunier. José Boccadifuoco estas la vicprezidantino kaj Annick Tora restas la prezidantino. La kotizo restos senŝanĝa (14^E). A. Capus informis pri la subvencio atribuita de la urbestro, ĝi estos bonvena pro la antaŭviditaj elspezoj (inter aliaj ordigo de la biblioteko dank'al G. Gonthier kaj C. Mouré). Ni estis informitaj pri la vizito de Brazilano (*vidu la apartan raporton*) la 15an de februaro.

Kunveno de la 6a de marto : 12 partoprenantoj, 5 senkulpiĝis . Ni deziras al Sro Defoly bonan resaniĝon kaj paciencon post falo . Ni ricevis la subvencian promesitan kaj leteron simpatian kaj favoran al E° de nia urbestro . Nia prezidantino raportis pri la vizito de Flavio Rebelo, brazilano . Christian kaj Hélène montris la belan laboron faritan pri la organizado de la biblioteko en Lunel-Viel . Ĝi enhavas nun 122 librojn . Ges. Cayzac prizorgis ĝin ĝis nun . Ĉijare ni heredis la librojn de forpasinta samideano . Christian enkomputiligos la titolojn kaj tiel ni povos konsulti la liston (helpantoj estos bonvenaj por la funkciado) . Kiel kutime ni finis per agrabla komuna tagmanĝo .

Vizito de Brazilano : alvoko por establi internacian televidon en esperanto (jes, ja !)

NDLR : partoprenis malfeliĉe nur 8 homoj en la kunveno de Montpellier (la unua el tri en Francio) .

Parte kulpas Flavio mem, kiu ne informis anticipe tre klare ; ankaŭ parte kulpas la organizantoj, kiuj forgesis informi SFS, kiu ĝuste ekzistas por informi la regionan esperantistaron .

Raportoj pri tiu grava vizito aperis en diversaj gazetoj, jen tiu el « E -Ile de France », surbaze de tiu de Christian Pinard, kiu partoprenis la kunvenon de Montpellier...sed loĝas en Prades (66) !



Flavio Rebelo : « Mi parolas al vi pri revo ! »

Kiom da fojoj ni esperantistoj aŭdis : "Estus bone se ni havus televidon por montri tion aŭ tion al la mondo ! Oni taksus nin pli bone..." Laŭ Flavio Rebelo, ĉefredaktisto de Ĝangalo kaj iniciatinto de la onta televidkanalo ITV, tiu revo iĝos realo... Sed pri kio temas ?

La ideo estas krei post malpli ol unu jaro retan televidon, uzante la novajn eblecojn de la reto, precipe la elsendfluan, anglalingve "streaming", kies ĉefa eco estas : la kvalito ! Ĉar tiu televido, videbla de ĉiuj, aperos kiel elmontrilo de Esperanto kaj ties kulturo kaj movado.

La celo estas unuatempe elsendi 4-horan programon ripetatan 6 fojojn tage : tiel, ĉiuj mondĉivitanoj povos spekti ĝin. Post kelkaj jaroj, li celas 4-foje 6-horan programon, poste 3-foje 8-horan.

La enhavo estos tiu de iu ajn alia televido : televidjurnalo, intervjuoj, dokumentarioj, kinaĵoj, porinfanaj mov-desegnaĵoj, kursoj... La ĵurnalojn nutros Ĝangalo mem, tra ties tutmonda korespond-servo kaj ties ok redaktejoj. La filmoj, krom tiuj jam ekzistantaj en Esperanto, venos el Unesko, el UNO..., kiuj pretas preskaŭ donaci filmojn aŭ mov-desegnaĵojn, kiujn sufiĉas subtitoligi aŭ dubli.

Por krei ĝin, Flavio bezonas monon : 35 000 eŭroj, por ke la projekto ekestu. Pro tio li nun traveturas Eŭropon. Tuj kiam la "trezoro" atingos 12 000 eŭroj, la unua dungo estos tiu de profesiulo, kiu serĉos entreprenojn celantajn pagi publikaĵojn en tutmonda monstro-fenestro... Ne temas pri mondonaco, sed pri prunto, pri kvazaŭ akcioj. Al la hel-

pemaj esperantistoj li proponas du garantiojn :

— se la kreo de la projekto ne eblos antaŭ Julio 2005, li repagos ĉion al tiuj, kiuj pruntedonis pli ol 25 eŭrojn;

— se la projekto sukcesos, li proponas aŭ pagi profitparton, aŭ transformi la monon al rabataj akcioj (io kiel "stock options").

Ĉiu pruntinto povas sekvi kaj kontroli la kontojn tra la ITV-retejo per kromnomo kaj pasvorto. Oni povas pagi per bankokarto kaj "Pay-Pal" (sekura pag-sistemo tra interreto).

Se la pruntinto ne havas interreton, li povas doni adreson kaj telefonnumeron, por ke ITV povu sendi raportojn. U.F.E. ankaŭ pretas esti peranto por ĝiri la sumojn en la konto GXAN-V de Ĝangalo.

Ĉu aceti eron de estonta televido estas freneza aŭ reva agado ? "Ne pli ol aceti la libreton "Lingvo Internacia" antaŭ 117 jaroj", Flavio respondas.

Fakte, la intereso estas, ke ĝi enigis Esperanton en ĉies internacian nunan informilon. Plie, ĝi ne estas projekto de brazilano por Brazilio, de ret-entrepreno por retanoj, sed de esperantisto por Esperantio kaj la tuta mondo, ĉar finfine ITV celas esti dissendata per kablo aŭ satelito.

Vere, la projekto eblas : Flavio turneis en nur tri urboj antaŭ Parizo, kaj jam ricevis kuraĝigan kvanton da mono. Li esperas, ke forta subteno de la Eŭropa parto de Esperantio igos la Amerikan kaj la Azian eniri tiun movadon. Ĉu neatingebla celo ?

Reverkis kaj pliriĉigis J.L., el raporto de Ch. Pinard (Montpeliero)



La plej granda revolucio por Esperanto – la establo de internacia televidkanalo en la Internacia lingvo.

Oni fermu al si la okulojn, kaj dum momento revu ... kaj en tiu revo, oni komforte sidas sur fotelo en sia hejmo, kaj ŝaltas la televidilon. Oni selektas la kanalon, kaj eksonas en la salono la internacia lingvo – jes, el la televidilo venas noticoj, varietoj, filmoj, dokumentarioj kaj multe pli, en Esperanto.


Ne, oni ne revas. ITV (Internacia Televido) tre baldaŭ estos reala. La komunumo, kiu parolas en Esperanto, tra la tuta mondo, povos ĝue spekti programojn la plej diversajn, tre alvinelajn kaj bonkvalitajn, en flua kaj bone prononcata Esperanto.

Kun la helpo de la esperantistaro, alvenas la tempo por televido en Esperanto. Alvenas la tempo por ITV – Internacia Televido.

La ĉi-supra teksto estas la enkonduko de prospekto havebla de SFS.



INTERNACIA
SEMAJNO
ĈE
MEDITERANEŬO



De la 21-a ĝis la 28a de
aŭgusto 2004

Staĝo en Sète
(Francio)

<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>

INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

ESPERANTO, KULTURO KAJ PROGRESO
proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipopvon
pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en
la havenurbo SÈTE, en ripoza parko de pluraj
hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala
periodo pro la bona vetero sed ekstere de la
somera troa homamaso.

Ĉe ni, vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ
banadon, ekskursojn kaj ... bonan manĝaĵon

SÉJOUR LINGUISTIQUE EN BORD DE MER

ESPÉRANTO CULTURE ET PROGRÈS vous
propose d'apprendre ou de vous perfectionner
en Espéranto.

Profitez-en pour passer en même temps
d'agréables vacances à Sète, dans un parc
reposant de plusieurs hectares au bord de la
Méditerranée pendant une période idéale
jouissant d'un temps agréable et en dehors de
l'afflux estival.

Chez nous, vous pourrez suivre des cours de
plusieurs niveaux mais aussi profiter de
baignades, excursions et..... bonne table

30-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
30ème semaine internationale d'Espéranto
SÈTE (Francio) 2004-08-21 / 2004-08-28

ALIGILO BULLETTIN d'INSCRIPTION

Familia Nomo

Nom

Persona Nomo

Prénom

Adreso

Adresse

.....

.....

.....

tel.num. :

n° tél

Mi loĝos en feriejo « Le Lazaret »

Je logerai à la Maison « Le Lazaret »

Mi antaŭmendas unu liton Je réserve un lit

en unu persona ĉambro

dans une chambre d'une personne

en dupersona ĉambro

dans une chambre de 2 personnes

en familia ĉambro

en chambre familiale

Mi ne loĝos en Lazaret sed manĝos regule tie

Je ne logerai pas au « Lazaret » mais j'y

mangerai régulièrement

Sendu la aligilon al : Envoyez ce bulletin à
ESPÉRANTO CULTURE et PROGRÈS

5, rue du docteur Roux

FR-34090 MONTPELLIER Francio

Pagu al : Esperanto Culture et Progrès

Payez à : CCP n°: MON 73 73 65 E

ATTENTION: Bonvolu aldoni koverton kun adreso
joindre une enveloppe avec adresse

6

30-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
30^{ème} SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPÉRANTO
21/08/2004 - 28/08/2004 **Le LAZARET** **SÈTE (Francio)**

Adreso dum la semajno :
Adresse pendant le séjour :

Maison Familiale « Le Lazaret »
La Corniche, rue du Pasteur Benoit 34200 SÈTE (Francio)
tel : 33(0)4 67 53 22 47 fax : 33(0)4 67 53 36 13

Programo :

Matene : diversnivelaĵoj kursoj
Posttagmezo : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo
Vespere : distraj kaj kulturaj programoj
Ekskursoj : multaj eblecoj surloke

Programme :

Matinée : cours de plusieurs niveaux
Après-midi : excursions, cours ou temps libre
Soirée : programme culturel ou divertissements
Excursions : nombreuses possibilités sur place

Aliĝkotizoj : 55 Eu. antaŭ la 1-a de majo 2004
70 Eu. post tiu dato
senpaga por malpli ol 26 jaraĝaj

Adhésions : 55 Eu. avant le 1^{er} mai 2004
70 Eu. après cette date
gratuit pour les moins de 26 ans

Loĝado : pluraj eblecoj

- En « Lazaret » jen la prezoj por unu semajno; ĉambro kaj 3 manĝoj tage
La feriejo taŭgas por rulseĝuloj

Logement : plusieurs possibilités

- Au « Lazaret », prix pour une semaine ; chambre
et 3 repas par jour
Locaux adaptés pour fauteuil roulant

1 persono en unupersona ĉambro : 363 Eu.
1 persono en dupersona ĉambro : 280 Eu.
1 persono en familia ĉambro : 260 Eu.
prezoj por infanoj laŭ peto

1 personne dans une chambre d'une personne : 363 Eu.
1 personne dans une chambre de 2 personnes : 280 Eu.
1 personne en chambre familiale : 260 Eu.
tarif pour enfants sur demande

Mendo de loĝado : post antaŭpago de 100 Eu.
antaŭ la 15 07 2004

Réservation : après paiement d'un acompte de 100 Eu.
avant le 15 07 2004

- Eblas tendumi en la cirkaŭaĵo
- Multaj hoteloj en la urbo

- Possibilité de camping autour de la ville
- Nombreux hôtels en ville

Aliĝoj, klarigoj, mendoj je :

ESPÉRANTO CULTURE et PROGRÈS: 5, rue du docteur Roux FR-34090 MONTPELLIER
tel/fakso : 33 (0)4 67 54 15 43

Poŝtkonto/CCP : n° : MON 73 73 65 E

jf.passarella@free.fr

!!!! Konservu tiun parton !!!!!

!!!!!! Conservez cette partie !!!!!!!



1- Se vi manĝos en feriejo « Le Lazaret » :
Ĉu vi estas vegetarano ? Jes Ne

1- Si vous mangez au « Lazaret »
Êtes-vous végétarien ? Oui Non

2- Mi sekvos la kurson :
Je m'inscris au cours suivant :

- por komencantoj (pour débutants)
- paroligan kurson (cours 2^{ème} degré)
- perfektigan kurson (perfectionnement)

3- Ĉu vi volas ekzameniĝi ?
 jes ne
Voulez-vous passer un examen ?
 oui non

Por ĉiaj klarigoj telefonu :
Pour tous renseignements téléphonez :

Francio 04 67 54 15 43

fakso fax : 04 67 54 15 43

aŭ ou : jf.passarella@free.fr

KATALUNIO

Niaj geamikoj el (Suda) Katalunio invitas al du aranĝoj, kiujn ili organizas en nia regiono

- al semajnfino komence de majo por konatiĝi, lerni, sin distri... (vidu detalojn ĉi-poste)
- al la 32a kataluna kongreso fine de oktobro en Céret ; la aliĝilo por tiu evento troveblas en la venonta SFS (la limdato de la kotizoj por la unua periodo estos la 31a de julio, do...)

PRINTEMPA LERNA RENKONTIĜO


**1an kaj 2an de majo 2004
en Porta (Cerdanya)**

Oni celas renkontiĝon je diversaj niveloj de lingvo kie ĉiuj trovos sian lokon:

- ✓ Ni malkovros aŭ plibonigos nian esperanton ludante
- ✓ Ni konos kelkajn el la plej interesaj iniciatoj de la esperanto-movado: eldonadoj, diskaj...
- ✓ Ni ekkonos la esperanto-literaturon
- ✓ Ni kantos, ludos, ekkursos...

PRINTEMPA LERNA RENKONTIĜO

De sabato la 1a de majo 2004 je la 15:00a ĝis dimanĉo la 2a post la tagmanĝo



En gastejo Equilibre
La Pastorale
66700 PORTA
Tel. +33(0)4.68.04.83.92
www.equilibre.fr

atingebla trajne ĝis Porta (linio de la Tor de Querol); aŭte tra tunelo Pl Morent por norduloj, tra Pulgarçadà por suduloj, tra Coll del Pl Morent por andoranoj, kaj tra Mont Lluís kaj Saillagosa por orientuloj.

Limigitaj lokoj, bonvolu antaŭmendi.
Endas kunporti dormosakon aŭ litukojojn.

Kotizo (inkluzivas programon kaj plenan gastigadon)
Antaŭpage 39 EUR
Surloke 44 EUR
Antaŭpagoj al kontonumero:
2100-0461-90-0200055053 de "Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona, Agència 461"

Vi povas aliĝi:
- retroŝte al: kea-kasisto@esperanto-ct.org
- poŝte al "Apartat 1008 - 08200 SABADELL"
- telefone al +34 93 710 96 36

Indikante vian nomon, adreson, telefonon, retroŝton, kiom da homoj venos, viajn manĝopreferojn (dispone de la gastejo), kaj kiamaniere vi pagos

LOZERE (ekzempla departemento !) 2 artikoloj en « Midi Libre » (23 I + 19 III)

Une Lituanienne de passage

Avec la fédération régionale d'espéranto

Il y a quelques jours, Jean Hénin, président de la fédération régionale d'espéranto, a fait découvrir les charmes de La Canourgue à Grazina Opulskiene, sympathique Lituanienne qui a entrepris un mini tour de France pour présenter son pays.

En effet, le congrès international des espérantistes se déroule une année sur deux en Europe. Quelque 3 500 participants, originaires de 75 pays, avaient fait le déplacement jusqu'à Montpellier en 1998. Cette année, le congrès aura lieu à Pékin, en Chine, mais l'an prochain il se déroulera à Vilnius, capitale de la Lituanie.

Et ce rendez-vous est d'autant plus important qu'il s'agira de célébrer le centenaire de ces rencontres, le premier congrès d'espéranto ayant eu lieu en 1905 !

La Lituanie est un petit pays, le plus vaste et le plus peuplé des États Baltes avec ses 3,5 millions d'habitants. Après la chute du Mur de Berlin, les Lituanien ont proclamé l'indépendance de leur république vis-à-vis de l'ex-URSS en 1990... Et ils fondent de grands espoirs sur leur entrée dans l'Union européenne dans environ trois mois.

Grazina Opulskiene travaillait dans une usine de traitement des métaux et elle a dû se reconverter au moment de l'indépendance : elle est désormais bibliothécaire dans une école et enseignante d'espéranto.

Depuis qu'elle enseigne, elle voyage aussi beaucoup : l'Australie en janvier 2003, puis l'Allemagne à Noël et la France en janvier. Elle s'active pour préparer le congrès espérantiste de 2005 mais s'informe aussi pour anticiper les changements que représente l'entrée de son pays dans l'UE.



Ce jour-là, à La Canourgue, on parlait la langue universelle.

Cette adhésion suscite de grands espoirs mais aussi des craintes... Il est vrai que les différences sont notables par rapport à la France : environ 40 % des Lituanien sont des paysans, et le salaire moyen est de 300 € par mois. Par contre, tous les Lituanien parlent deux ou trois langues et

l'espéranto y est largement vulgarisé. Cette langue internationale, fondée en 1887 par un Polonais idéaliste, le Dr Zamenhof, est facile à apprendre et pourrait aider les Européens à communiquer entre eux sans avoir besoin de recourir systématiquement à l'Anglais. ●

L'Espéranto ouvre sur le monde... depuis Coperlac

Un couple de retraités, installé sur le causse, édite une revue spécialisée

■ A l'heure où le (déjà) fragile équilibre mondial semble toujours plus menacé, où certains pays tentent d'imposer leur prédominance politique, économique et culturelle, ne faudrait-il pas trouver un lien fort qui unisse les peuples ?

Cela pourrait passer par un langage universel. C'est en tout cas le credo de Francis et Monique Bernard, paisible couple retraité de l'Éducation nationale, désormais installé à Coperlac.

Eux dénoncent la trop large place de l'anglais dans la linguistique mondiale. « Pourquoi privilégier l'étude de la langue de Shakespeare à l'école ? », s'interrogent les deux ex-enseignants. « D'un simple point de vue éthique, ce n'est pas juste. Et, surtout, cela pourrait menacer la langue française à plus long terme. Comme les dialectes régionaux qui ont disparu au fil des siècles... »

Et Monique Bernard de faire le constat. Elle, petite fille qui a grandi à Caussignac, n'entend plus "chanter" l'accent occitan. Son époux, Breton pur souche, regrette le temps où il entendait parler sa

- Un lien qui unirait les peuples
- La disparition des langues régionales
- Et l'hégémonie de l'anglais
- Une langue à l'apprentissage très rapide
- Bimensuelle

grand-mère. « Des langues qui ont un passé littéraire ne sont plus usitées. Qu'advient-il du français, lorsque tout le monde parlera anglais ? »

Voilà pourquoi les retraités pro- nent l'utilisation de l'espéranto dans les échanges internationaux. « C'est une langue auxiliaire créée en 1887 par Zamenhof à partir de racines essentielle-

ment aux langues romanes. L'espéranto, c'est le droit des hommes à communiquer libres et égaux entre eux », explique Francis Bernard. « D'un point de vue grammatical, c'est un principe agglutinant. Aux racines, on ajoute des suffixes ou affixes. A partir d'un mot, on peut enrichir son vocabulaire très rapidement », poursuit Mme Bernard qui précise, pour démontrer la simplicité de l'apprentissage, que son mari s'est vite fait espérantiste... « alors qu'il était hostile aux langues étrangères ».

Cela fait peu de temps que le couple lozérien pratique assidûment la langue internationale, depuis qu'ils goûtent à une



Monique et Francis Bernard œuvrent à la promotion de l'espéranto.

paisible retraite. Ils en sont pourtant vite devenus des ardens défenseurs, après avoir découvert ses nombreux avantages.

Passionnée de littérature, Monique Bernard a ainsi pu s'ouvrir aux œuvres étrangères, traduites en espéranto. Sur- tout, elle et son époux ont pu rencontrer des personnes venues de différents pays, aussi lointains qu'exotiques. Ils ont en effet participé à des congrès internationaux, en France, Espagne ou ailleurs. « Cela nous permet de voyager et d'approcher ainsi de nouvelles cultures », expliquent-ils. « Lors de ces rassemblements, nous pouvons assister à des conférences sur des thèmes très variés ou parler avec des gens du bout du monde. Et on se comprend. Nous pourrions aussi voyager un peu partout, comme notre fille, actuellement à Katmandou (Inde). Mais nous préférons maintenant la tranquillité de Coperlac... »

Alors, Monique et Bernard reçoivent, dans leur douillette maison de Coperlac, des espérantistes voyageurs. Hollandais, Lituanais et même Japonais ou Chinois... les nationalités ont défilé. Des rencontres forcément enrichissantes.

Convaincus, donc, par l'utilité de la langue internationale mais plutôt "surpris"

de voir le peu de place qui lui est accordée - « un choix politique », estiment-ils -, Monique et Bernard ont repris depuis peu l'édition d'une revue bimensuelle spécialisée et simplement intitulée *Espéranto*, afin d'en faciliter sa promotion.

Tous les deux mois, environ 800 abonnés français et belges reçoivent ainsi dans leur boîte aux lettres, les dernières nouvelles du petit monde espérantiste et son évolution à travers la planète. Également au sommaire, la traduction de poèmes ou textes et les dates et lieux des prochains congrès. Un

lourd travail, « deux à trois heures quotidiennes », que Francis Bernard effectue avec beaucoup de plaisir. A son échelle, il contribue au développement de cette langue qui peut certes paraître utopiste au premier abord, « alors qu'elle pourrait simplifier les relations et apporter un peu plus d'égalité à travers le monde. »

Et nos retraités de citer l'exemple de ce couple, né lors d'un congrès, dont la femme est originaire d'Asie et l'homme d'Amérique du Sud. « Eux communi-quent grâce à l'espéranto, leurs enfants parlent les deux langues. Belle culture, non ? » Un monde idéal... ●

Ludovic TRABUCHET

« Simplifier les relations et plus d'égalité »

Diversaĵoj :

▶ **Tuluzo :** 2 memorindaj datoj
16-18 aprilo : ludo-semajnfino en Donneville
www.esperanto-jeunes.org/luda.htm
dim. 30 majo : forumo de lingvoj la tutan tagon
sur Place du Capitole

▶ **Nova magazino :** « Hades » estas
dulingva, en la franca kaj esperanto, temas pri
Eùropo kaj internaciaj aferoj kaj estas
disdonata senpage al gestudentoj .
www.hades-presse.com

▶ **Katalogo de UEA :** ĝi estas nun preta rete
kaj malfermita por publika aliro . Oni povas
serĉi la varojn laŭ diversaj kriterioj (kategorio,
titolo, vorto, aŭtoro, ktp) kaj eĉ konsulti
recenzojn. Komprenible oni povas ankaŭ rekte
mendi . <http://katalogo.uea.org>.

▶ **Enciklopedio en 50 lingvoj :**
Vikipedio, la multlingva rete konstruata
enciklopedio nun entenas 500 000 artikolojn en
pli ol 50 lingvoj, inter kiuj esperanto . 10
lingvoj havas pli ol 10 000 artikoloj, inter kiuj
esperanto . Eblas ekkunlabori por konservi al
esperanto tiun lokon en la vico de la lingvoj .
<http://eo.wikipedia.org>

▶ **Esperanto en radio-programoj :**
La retadreso <http://radioarkivo.org> ebligas nun
la aŭskultadon de mondaj stacioj, kiuj ĝis nun
estis malfacile atingeblaj . Post elekto de la
koncerna radiostacio, alklaku la daton de la
dezirata programo kaj estu iom pacienca, ĉar
via komputilo devas ŝarĝi la tutan registritan
elsendon kaj tio postulas iom da tempo . Tute
facile vi povos aŭskulti programojn de Radio
Varsovio, Radio Pekino, Radio Havana, Radio
Brazilo, Radio Vatikano kaj aliaj .
Informojn pri radioj en esperanto, frekvencojn,
horarojn, ligilojn, retadresojn, ktp vi povas
ankaŭ trovi ĉe
http://www.tejo.org/uea/Radioj_En_Esperanto
La sonarkivojn oni povas rekte atingi ĉe
<http://www.radioarkivo.org> Bonan aŭskultadon !

▶ **Instruado de la ĉina lingvo en Francio**
Ĝi progresas rapide, male al iuj lingvoj, kiel la
rusa aŭ la germana, kiuj regresas . La ĉina
estas nun instruata al 7631 gelernantoj de 142
kolegioj kaj liceoj, kompare kun 2800 gelernan-
toj en 1995 . Male al la araba aŭ la portugala,
ĝi estas 90% instruata al gelernantoj, kies
gepatra lingvo estas la franca .

▶ **2a Somera Mezeùropa Renkontiĝo**
disvolviĝos ĉijare en la montara regiono Eifel,
40 kilometrojn sudokcidente de Bonn, de la
26a de julio ĝis la ?

Kiel lastjare estas atendataj partoprenantoj el la
proksimaj landoj Nederlando, Belgio, Francio,
Luksemburgio . Lingvokurso dum la 5 unuaj
tagoj por komencantoj kaj progresantoj (26-30
julio) : rapide eklerni kaj tuj poste praktiki en
internacia medio, la ideala solvo .

Aĝogamo de infanoj kaj 20kelkjaruloj ĝis
70kelkjaruloj . Prelegoj, promenoj, ekskursoj,
ludoj, babilado. Ebleco loĝi en la domo aŭ en
tendo, ĉu manĝi grupe aŭ mem zorgi pri la
manĝoj . Rabato por eksterlandanoj kaj neniu
aliĝkotiĝo ĝis la fino de majo . Venu somerumi
kun ni ! <http://www.esperantoland.org/somere/>

Boulogne 2005
Pasko 2005 >>> 100 jaroj de rekontiĝoj

La Internacia Esperanto-renkontiĝo Boulogne2005
memorfestos la centjarigon de la unua Universala
Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Bulonjo-ĉe-
Maro (Boulogne-sur-Mer) en aŭgusto 1905.

- Ĝi disvolviĝos en Bulonjo dum Pasko en 2005: de
vendredo la 25-a ĝis merkredo la 30-a de marto.
- La temo de la renkontiĝo estos: *Esperanto:
perspektivoj post 100 jaroj de renkontiĝoj.*

Riĉa programo por granda evento:
Inter la diversaj programeroj estos:

- La malfermo en la urba teatro, same kiel en 1905.
- Prelego kun debato de Claude Piron,
- Spektaklo de la koruso Meven kaj Jacques Yvart,
- Ekskursoj en Bulonjo kaj ties regiono,
- Tuttaga ekskurso laŭ la paŝoj de Zamenhof.
- ktp.

Informas: <http://boulogne2005.online.fr>

▶ **EEU (Eùropa)-kongreso en Bilbao**
(25-29 VIII)

Jen la provizora programo :
merkredo 25 : akceptado, malfermo de la
kongreso, prelego pri Bilbao/Biskajo;
interkona vespero
jaŭdo 26 : pluraj prelegoj , ekskursoj (elekto
inter 3) , distra programo
vendredo 27 : prelego, akcepto en la urbodomo,
lunĉo kaj oficiala foto, ekskursoj, distra programo
sabato 28 : kongresoj de la diversaj asocioj,
fermo de la kongreso, spektaklo en teatro
dimanĉo 29 : tuttaga ekskurso : Bilbao, Gernika,
Mundaka (komuna manĝo en restoracio),
Bermeo (tipa fiŝkaptista urbeto),Lemoiz, Getxo
Retadreso : esperantobilbao@terra.com
TTTejo <http://www.geocities.com/esperantobilbao>

L'E° à l'Assemblée Nationale, au Parlement Européen et aux élections ...

Une action constante est menée auprès des élus, nécessaire pour l'officialisation éventuelle de la langue internationale. La campagne de l'an dernier auprès des députés avait débouché sur des questions écrites auprès des ministres. Espéranto-France a des contacts auprès des différents partis qui commencent à prendre conscience de la situation linguistique dans une Europe en pleine évolution. Lors de la séance à l'Assemblée Nationale du 6 janvier (diversité linguistique dans l'Union Européenne), M. Pierre Forgues (PS) a mentionné les possibilités de l'espéranto tout en soulignant les risques, pour des raisons budgétaires, de voir s'installer le recours à une seule langue pour les échanges, l'anglais. M. Jacques Brunhes (PC) a répliqué que la langue est un élément vital auquel nous sommes viscéralement attachés et que ce ne peut être un quelconque espéranto ou volapük, sans liens avec notre histoire, notre culture, notre pays, notre continent. M. Forgues a précisé alors que l'espéranto n'était pas là pour remplacer les langues mais pour servir de 2° langue pour tous les européens, ce qui renforcerait les autres langues.

Ce rôle possible de l'espéranto n'est pas encore compris de tous à Bruxelles. Mme Viviane Reding (commission européenne pour la culture et l'éducation) a rappelé que le plan d'action élaboré pour les langues sur la base du multilinguisme inclut les langues qui ne sont pas officielles mais sûrement pas l'espéranto, « parce que nous avons assez de langues vivantes qui sont en difficulté pour créer, à côté de cela, des langues artificielles ». La même personne avait écrit plus tôt à Germain Pirlot, espérantiste belge connu, que « incorporer dans l'apprentissage de plusieurs langues l'espéranto peut s'avérer être payant à long terme »...

Dernièrement, le député italien Gianfranco Dell'Alba, lors d'un débat à la commission des affaires constitutionnelles du parlement européen, a proposé que, lorsque une stricte égalité ne pourrait être en vigueur lors de l'élargissement de l'Union, le recours à une langue pivot neutre comme l'espéranto soit envisagé. Deux députés allemands et un français se sont opposés à la mention de l'espéranto. Les 32 signatures ayant été recueillies pour un nouvel examen de l'amendement, ceci grâce à l'intervention d'espérantistes, la proposition a néanmoins été refusée par 14 voix contre 12. Lors d'un nouveau vote en séance plénière (à mains levées), la proposition de M. Dell'Alba n'a pas été retenue. Dommage, bien sûr, mais il est révélateur que des craintes devant l'élargissement se soient exprimées et que la solution de l'espéranto ait été mentionnée et recueillie des soutiens.

Comme il est difficile, voire impossible, de contacter tous les candidats aux prochaines élections européennes, Espéranto France se propose d'intervenir auprès des élus, dès les résultats connus le 13/6. Toutefois, des espérantistes s'impatientent et pensent qu'il faut faire plus en présentant une liste

« EDE » (Europe Démocratie Espéranto) www.e-d-e.org. La liste Sud-Ouest (trois régions) est prête, la moitié des 21 candidats sont de notre région. Pour cette raison, parce que chaque point de vue a le droit de s'exprimer, et bien que nous ayons déjà discuté du sujet lors de notre congrès fédéral 2003 et qu'une majorité soit en désaccord avec cette démarche, vous trouverez ci-après le manifeste de EDE. Lors de notre rencontre de Narbonne (25/4), Thierry Saladin, tête de liste, viendra présenter son projet (16h30 à 18h). Dans « Le Pays Briard », hebdomadaire dont le rédacteur en chef défend régulièrement l'espéranto (5 lettres favorables de lecteurs parues le mois dernier, dont une de notre région), on a pu trouver aussi un communiqué de EDE, qui commence ainsi : « Appel aux abstentionnistes » (pourquoi seulement les abstentionnistes ?). « Oui, la langue internationale Esperanto est bien vivante et en pleine évolution, on en trouve la démonstration sur Internet. Ce sont les esprits qui sont endormis par des croyances infantiles bien orchestrées en faveur des langues nationales dominantes. La soumission aux Etats-Unis en particulier et la promotion abusive de leur langue n'offrent de liberté, ni aux peuples ni aux Etats. C'est un instrument d'asservissement économique et culturel qui empêche toute émancipation humaniste ».

La formulation semble quelque peu excessive...

J.H.

**Strasbourg : 9 majo 2004 « Eùropa Bunto » :
manifestacio por lingva demokratio en Eùropo**

André CHERPILLOD

UNE LANGUE POUR L'EUROPE ?

MAIS OUI !
pour sauver les langues
de l'Europe...



Editions La Blanchetière

*Ce livre de 80 pages
vous sera proposé à
l'achat lors de notre
rencontre de Narbonne*

E° D° E°

- Europe - Démocratie - Espéranto -

"L'Europe pour s'entendre, L'Espéranto pour se comprendre"

Expliquons pourquoi à nos yeux, un renouveau démocratique en dehors des partis "traditionnels" est utile voire indispensable !

La création de cette liste **"Europe Démocratique Esperanto"** est motivée par une prise de conscience chaque jour plus aigue, et nous l'espérons pour un nombre croissant de citoyens, que *l'Europe n'a toujours pas mis en place les outils d'un fonctionnement démocratique.*

Les élections européennes ont jusqu'à présent relativement peu mobilisé les citoyens. Ces élections prennent généralement l'allure de nouvelles compétitions entre les partis politiques nationaux, généralement anciens. Pour ces listes, il s'agit le plus souvent de remporter une victoire électorale sur des programmes, fortement inspirés de leurs contradictions, leurs rancunes précédentes, sans réelle prise en compte de leur intérêt pour une campagne d'élection d'un parlement européen.

Si 50 % des citoyens ne votent pas, si bon nombre de ceux qui votent le font sans enthousiasme, c'est qu'en toute logique, ce que proposent les listes électorales "traditionnelles" n'est pas conforme à leurs préoccupations. Aussi il nous semble absolument normal de proposer à nos concitoyens un programme nouveau.

Ce programme propose de commencer d'abord par assurer les outils pour une démocratie participative en Europe.

Nous sommes convaincus que rien de sérieux, de bénéfique pour les citoyens européens, ne peut être réalisé sans assurer tout d'abord la possibilité de débat entre eux. C'est alors que souvent s'interposent, les experts en ceci ou en cela, ou les mastodontes de la politique, ou quelques lobby opaques, pour déclarer le bien, le mal, le possible, l'impossible, le raisonnable, etc....

Même si ces élites pouvaient mettre à leur actif un résultat louable, nous ne sommes pas d'accord pour qu'un tel système, très éloigné de notre conception de la démocratie persiste. Nous proposons aux électeurs de voter pour témoigner, qu'ils attendent une vraie représentation démocratique européenne, qui remettent les "technocrates" à la place qu'ils n'auraient jamais dû quitter, celle d'éventuels consultants au service des choix citoyens.

Le droit, et surtout **la possibilité d'expression, d'intervention, de débat direct entre les citoyens européens, nous semblent donc le préalable incontournable de la construction de l'Europe.** Or ces préalables ne sont traités par aucune liste. Remarquez comme les élites, les technocrates en place semblent attentifs à maintenir une hégémonie linguistique évidente, qui interdit la communication directe entre l'ensemble des citoyens européens. Nous voulons faire obstacle au *"diviser pour mieux régner"* et au *"faire taire pour soumettre"*. Nous sentons la pression hégémonique s'intensifier, la décadence par une pensée unique s'insinuer dans tous les rouages d'une gigantesque administration, qui échappe par voie de conséquence, à tout contrôle démocratique.

Faire le choix d'un programme, soucieux d'obtenir la possibilité d'expression pour tous, nous semble hautement justifié. *Ce programme place le débat démocratique au coeur de la construction européenne. Il met en place les outils capables d'assurer, dans la pratique, les droits universels des citoyens proclamés dans les textes fondateurs du droit européen et international. Il montre le chemin d'une vraie solidarité européenne dans l'assurance de l'identité culturelle et linguistique de chaque citoyen européen.*


Ce texte paraît sous la responsabilité de ses auteurs

Lastminute : « Attac » organizas en Béziers je vendredo la 30a de aprilo debaton pri la estonta Eùropo. Partopreno de esperantistoj estos bonvena .

Ministre de l'a-culture (ou de l'inculture)

Cela se passait récemment, le 16 Mars, sur « France Inter » lors de l'émission « Alter Ego »; le thème choisi était : quel avenir pour la langue française ? L'un des deux invités était M. Aillagon, alors ministre de la culture . Un auditeur est intervenu pour demander si, en plus de défendre notre langue, il ne serait pas bon de promouvoir la paix dans le monde, la compréhension entre les peuples par une langue universelle qui s'appelle l'espéranto...

La réponse longue et peu claire du ministre (envoyée sur demande) se conclut par l'affirmation que « l'espéranto, c'est sympathique mais la langue en question est quand même une langue un peu sommaire, un peu pauvre, une sorte de rapiéçage de langues, de morceaux de langues puisés ici et là... » Et la journaliste de service de renchérir que l'espéranto « ça n'a pas pris... ça ne marche pas... » Voilà comment en quelques phrases assassines on peut répandre des informations erronées, basées sur des préjugés . Bien sûr, il y a eu des réactions des espérantistes, tout de même mieux informés de la réalité, dont celle, très percutante, de Claude Piron (texte sur demande) . Inutile de remercier M. Aillagon, le Premier Ministre l'a déjà remercié !




Un voyageur hors du commun

Yoichi est un Japonais de 32 ans qui a quitté son pays depuis deux ans et demi pour découvrir le monde . Il a visité la Corée, la Chine, l'Inde, le Pakistan, l'Iran, la Turquie et enfin divers pays d'Europe dont la France . Il était dernièrement en Lozère . Vivant sur un budget modeste, il utilise aussi les services de « Pasporta Servo », le réseau de familles (1227 dans 79 pays cette année) qui accueillent bénévolement ceux qui pratiquent l'espéranto . Si Montpellier compte 4 adresses, le reste de la région ne propose que 4 adresses . Ce pourrait être mieux...

Des voyageurs hors du commun

Lors du prochain congrès de Sat-Amikaro à La Roche-sur-Yon (Vendée) –plus de 200 inscrits- les voyageurs au long cours, qui ont utilisé l'espéranto pendant leurs périples, se retrouveront . Il y aura Gudule Le Pichon et Laurent Cuenot (5 ans et demi en roulotte dans 16 pays d'Europe, avec un enfant au départ et deux au retour), Rachel Prual et David Cholet (2 ans en auto-stop autour du monde, dans 36 pays), Véronique et Boris Bouchez (un an autour du monde), Maryvonne et Bruno Robineau (bien connus chez nous, 8 ans autour du monde , 2 enfants adoptés au retour, auteurs de livres en français et espéranto) . Un autre couple est parti de Montpellier il y a quelques mois (voir <http://dessinemoiunchemin.free.fr>) . Qui doute encore que les voyages forment la jeunesse ? Un retraité breton, Zéphirin Jégard, partira le 1° Mai pour relier Brest à Vladivostock (14000 km, 200 km chaque jour) . Il a déjà d'autres voyages en Espérantie à son actif...



Demande d'aide : Le cours d'espéranto sur internet, victime de son succès, manque de correcteurs . Les 40 correcteurs bénévoles ne suffisent plus pour les 197 élèves. Il est passionnant de voir ses élèves progresser dans la langue et de leur faire partager notre enthousiasme . Il faut compter 20 à 30 minutes par élève et par semaine, plus quelques minutes pour la partie « administrative » (petit compte-rendu bimensuel) . C'est maintenant que se préparent les générations futures d'espérantophones . Qui accepterait d'aider ? Renseignements auprès de : axel584@axel584.org ou cocotte34@infonie.fr


Anekdotoj :

Mi vojaĝis decembre en Egiptio . Ni vizitis multajn templojn, piramidojn, la bibliotekon de Aleksandrio kaj aliajn interesajn lokojn; eĉ ni grimpis sur la monto Sinajo . Kiam mi vojaĝis ŝipe sur la Nilo, mi restis tre ofte sur la ferdeko. En la blua ĉielo brilis arde la suno. Do, mi surmetis ĉiam belan kaskedon, blankan kun larĝa verda viziero ; sur la kaskedo bone legeblis « S.A.T. Esperanto » . Oni disdonis ĝin en la kongreso de Alicante . Ĉiutage mi esperis, ke iuj inter la grupanoj demandos min scivoleme pri esperanto . Bedaŭrinde, ili preferis paroli pri la faraono Ramses aŭ la reĝino Hatchepsout . Tamen, mi esperas, ke multaj personoj, vidinte mian kaskedon, scias nun pri la ekzistado de esperanto .

Mi partoprenis en la ĝenerala kunveno de la asocio « Francio-Kubo /Hérault » . Mi diris al la diplomato Sinjoro Sanchez, kiu venis de Parizo, ke en la gazeto « Esperanto Info » mi legis tiun anoncon : 21-27 Marto 2004, 6a kongreso de esperanto de Amerikoj en Havano . La diplomato konas esperanton sed li ne parolas ĝin . Li precizigis, ke lia lando ĉiam disvolvas la praktikon de tiu lingvo, ĉar ĝi estas lingvo de paco, amikeco, komerco, komunikado inter popoloj . Sed nune la eduksistemo privilegias la anglan kaj francan lingvojn, la plej uzitajn mondscale . Poste, esperanto iĝos pli kaj pli konsiderinda en eduksistemoj kaj en Kubo . La paroloj de Sinjoro Sanchez ĝojigas min . Ankaŭ, mi opinias, ke tie, kie troviĝas homoj pretaj aŭdi nin, ni devas paroli pri esperanto .

Jacqueline Maurel, kun la helpo de la lernantoj kaj de nia gvidanto J-P .

NDLR : Konsentite kun la konkludo de Line . Pri la vizito de Egiptio, antaŭ kvin jaroj, ni havis alian sperton . T-ĉemizoj kaj kaskedoj ne ĉiam sufiĉas por atentigi pri esperanto . Okaze de vojaĝoj eksterlande, ni ĉiam provas renkonti lokajn geesperantistojn . Plej bone oni kontaktu ilin anticipe . Esperantistoj ne abundas en Egiptio, tamen ekzistas kelkaj, kaj ni kontaktis junan esperantistinon, kiu ankoraŭ neniam havis la okazon paroli la lingvon . Dum la krozado sur Nilo, dum la horoj sur la ferdeko, la diskutoj foje temas pri la malfacila komunikado kun la lokuloj (nur kelkaj vortoj en la angla aŭ la franca) kaj tiam ni menciis esperanton kaj nian planitan rendevuon kun juna Egiptino . En Kairo estis duontago libera . Ni petis la permeson lasi la grupon, la gvidantino ne tro ŝatis, pro sekurecaj kialoj. Tamen ni subskribis senkulpigan leteron kaj same faris pluraj aliaj. Ni havis la okazon vojaĝi solaj per metroo kaj taksio en Kairo (neforgesebla sperto) kaj precipe renkonti nian novan amikinin, kiu ankaŭ tre ĝojis renkonti nin . Je nia reveno ne mankis demandoj, por scii, ĉu la komunikado per esperanto bone funkciis, kiel nia samideanino estis vestita kaj ĉu ŝi estis sola, ktp...



Gazetartikoloj ricevitaĵ ĉi-trimestre aŭ menciindaj : (dankon al la sendintoj)

« Libération » (9 I) : J-C. Trichet, franco kaj direktoro de EBC (Eŭropa Banko) en Germanio, uzas la anglan prefere ol la francan...

« La Croix » (30 I) : longa artikolo kun foto pri Expolangues kaj esperanto .

« Ottawa Citizen » (31 I) el Kanado ! Tre longa artikolo en la angla pri esperanto kaj tre favora .

« Le Monde » (16 II) : pri la regreso de la franca lingvo en la eŭropaj instancoj .

Kaj en la gazetaro de nia regiono, krom du artikoloj de « Midi Libre » troveblaj en tiu-ĉi bulteno :

-pluraj kontribuoj de legantoj de M.L pri la lingvo-problemo (ĉu favori la okcitanan aŭ la anglan ?)

-alia kontribuo de leganto en « L'Indépendant » (10 II) pri la kataluna kaj esperanto .

-artikolo en « L'Indépendant » (18 II) pri la regreso de la franca en Bruselo . ***Sekve de tiu artikolo, Jean Amouroux (Perpignan) skribis al Prezidento Jacques Chirac por atentigi lin pri la neceso defendi la francan lingvon kaj demandi lin pri la eventuala solvo dank'al esperanto . Venis afabla respondo de la kabinetestro por certigi pri la atento de la Prezidento sed sen mencio de esperanto .***

-artikolo en M.L. (28 I) pri lingvoj okaze de Expolangues kaj mencio iom primoka de esperanto .

-paragrafo en ML (14 III) pri la starigo de la listo EDE en la sudo .

Sendu viajn trovitaĵojn al SFS kaj ne forgesu reagi, gratuli la gazetojn aŭ foje rebati !

KRUCVORTOJ

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

I									
II									
III									
IV			■			■			
V				■					
VI			■				■		
VII				■					
VIII							■		
IX								■	
X			■						

HORIZONTALA

- I) - n !
- II) - Kontraŭvenen(o).
- III) - Tropika fruktarbo.
- IV) - s : Por labori / s : eksimperia urbo
Mezorianta stepa land(o).
- V) - Fel(o) / Printempa.
- VI) - Returnita simbolo / s : Estimo / Restig(i).
- VII) - Greka litero misorde / s : Baldaŭa skribo.
- VIII) - Sudamerika river(o) / Du el kvin.
- IX) - Stabilec(o).
- X) - Malnova mezurunu(o) / Preĝeja meblo.

VERTIKALE

- 1) - Senĝen(o).
- 2) - Kuracilo.
- 3) - s : lanugo / Mangotato(o).
- 4) - Rabobest(o) / Bleki.
- 5) - Turk(a) / Ekstera.
- 6) - Natura akv(o) / Misal(o).
- 7) - Malsane flav(a) / s : Maŝino ?
- 8) - « D-ro Esperanto federacia », ordigota /
Duonrara.
- 9) - Salo.
- 10) - Patronomokono.

s : sone

BOPARO




Solvoj de la numero 167a :

Horizontale : I.Direkteron II.Ikonografi
 III.Romul . Anet IV.Lna. Ber . Lr V.Ionian
 Pio VI Dk Ustilag VII.Ilini Re
 VIII.Dagestanan IX.Ise Tokato X.Itrio Ajl
Vertikale : 1 Dirlididii 2.Ikonoklast
 3.Roman Iger 4.Enu Iune 5.Kolbasisto
 6.Tg Ent To 7.Erar Iraka 8.Ran Plenaj
 9.Ofelia Atl 10.Nitrogeno

Sur benko (anekdotoj el « La Informilo »)

Tri patrinoj, kiuj kutimas renkontiĝi sur benko en la urbo-parko, sidiĝas silente... Subite unu suspirĝemas « *Ne ! Tute ne ! ekkrias la du aliaj, hieraŭ ni decidis, ke hodiaŭ ni ne prialudus niajn infanojn!...* ».



Tri maljunuloj babilas sur benko kaj elvokas siajn proprajn san-problemetojn .
 « *Koncerne min, diras la unua, suferigas la kruroj . Eĉ la taggazeton por mia edzino mi ne plu povas iri aĉeti en la tute proksima kiosko...*
 -Nu, ne plu volas obei miaj brakoj, diras la dua, kaj la marmelado-poton por mia edzino mi ne plu kapablas kapti supre en la ŝranko...
 -Kaj, diras la tria : « *Imagu, ĉi-matene je la 9a, mi deziris dediĉi dolĉan kison al mia edzino...Sed ŝi kun granda surprizo akre reagis...Nur antaŭ duonhoro min ci kisis...sed vere ne dolĉe !...*
 ...Vidu, amikoj miaj, miaopinie ligiĝas mia problemo al memor-difekto ! »

Venonta bulteno : ĝi aperos komence de julio (poste forestos la redaktoro !). Bonvolu sendi ĝustatempe, plej malfrue ĝis **la 23a de junio**, viajn kontribuojn, raportojn, artikolojn, ktp .
Anticipan dankegon !
 Jean Hénin – Beauregard –Route de Montcayroux 48500 La Canourgue
 telefono/telekopio :04 66 32 86 36
 jean.henin@wanadoo.fr